


La letero de l' Akademio de Esperanto

N° 1 — Oktobro 1987



Bedaŭrinde ni konstata, ke la Akademio de Esperanto, iniciatita de Zamenhof en 1905, ne estas konata de la publiko, Esperantista aŭ ne: por unuj ĝi estas iu mistera institucio; por la aliaj ĝi estas ne konata, eĉ ignorata!

Tamen ĝi estas nepre bezonata: ĉiuj lingvoj tendencas diseriĝi, se uzataj ekster eta teritorio: la nia estas uzata en la tuta mondo kaj submetata al ĉiaj ventoj kaj uraganoj; la Ido-skismo skuegis ĝin. "I.A.L.A." iom tremigis ĝin. Nun aperas aliaj minacoj: skemismo kaj naturalismo riskas ĝin distiri al kontraŭaj direktoj. Nur centra Akademio kun anoj el la tuta mondo povas funkcii kiel voj-indikilo: memoru la ekzemplon de la participoj!

Naskiĝinta fine de l' 19-a jarcento, Esperanto gajnis siajn unuajn venkojn en la 20-a: ĝi ĉesojlas jam la 21-a, en kiu la satelitoj inundas la terglobon, en kiu la plej modernaj komunikiloj solidarigas la Homaron. ESPERANTO, unu el la plej gravaj sociaj faktoj de la jarcento fariĝu tiu nepra kaj ne-preterebla komunikilo de la 21-a jarcento.

Ĉu utopio? Siatempe iu Esperantisto, Jules VERNE skribis: "Ĉio iam farita en la mondo, fariĝis nome de troigitaj esperoj!"

Sed ni, Esperantistoj, eliru el niaj fermitaj rondoj, el nia "getto". La mondo estas vasta lingvo-batalejo, en kiu la grandaj lingvoj militas unu kontraŭ aliaj: se ni estos, ni estos meze de la batalejo. Cetere jam nun la lingvo-problemoj ŝprucas el la ĉiutaga vivo de nia Esperanto-mondo. Ili ampleksiĝos en nemezureblaj dimensioj kaj ni devos dinamike adaptiĝi al ĉiam novaj cirkonstancoj: ĉiam en la dezirata kaj bone komprenita unueco.

Pro tio la Akademio nepre bezonas organon por aŭdigi sian voĉon, por ĝuste aŭskulti kaj rapide respondi al la demandoj de Esperantistoj: de la ordinara homo ĝis la sciencisto en sia laboratorio, pasante tra la teknikisto ĉe sia laborejo; ĉiuj same frontas la esprim-materion! Siatempe la Lingva Komitato ĝuis la "Oficialan Gazeton" dank'al mono de generalo SEBERT kaj al la klera saĝo de Rektoro BOTRAC...

Hodiaŭ jen "La Letero de l' Akademio de Esperanto"! Per ĝi ni esperas veki vian atenton, vian, subtenon kaj vian partoprenon: vi estu membroj de Akademioj, de Universitatoj, vi estu verkistoj aŭ ordinaraĵ Esperanto-uzantoj! "La Letero" estas destinata al ĉiuj, kiuj ŝatas flegi Esperanton kiel lingvon unuecan kaj volas ĝin kultivi kiel belan sed ankoraŭ minacatan planton. Parolvicon havos ĉiuj Akademianoj kaj ne nur Estraranoj kaj Direktoroj de Sekcioj kaj Komisionoj. Specialistojn el ekstere ni invitos doni sian opinion.

Ni ĉiuj kune kultivos nian lingvon: ni volas ĝin fiera kaj bela, forta, bonfarta kaj ĉia-frukta!

André ALBAULT
Prezidanto
Akademio de Esperanto

OFICIALAJ INFORMOJ

de

L'AKADEMIO de ESPERANTO

Nova serio N° 5

Julio 1986

Sendependa lingvo-institucio fondita de D-ro L.L.ZAMENHOF en 1905

D-ro A.ALBAULT, 21, rue de Verfeil F 31200 TOULOUSE, Francio

Post studo kaj propono de la Gramatika Sekcio la Akademio voĉdone akceptis jenan rezolucion:

PREPOZICIAJO POR LA SUBJEKTA SUPLEMENTO

1. Post ita/ata/ota-vorto, la aganto estas indikita per DE. Ekz-e, ŝi estas amata de ĉiuj. (6-a Regulo de la Fundamenta Gramatiko).
2. Post o-vortoj, DE povas indiki la aganton, se neniu alia koncernato estas ebla. Ekz-e, la kanto de la birdoj, la projekto de la inĝenieroj (Fundamento), la parolado de la oratoroj, k.s.
3. Por indiki la aganton post o-vortoj en aliaj kazoj, la plej ĝenerale akceptita formo estas FARE DE. Ekz-e, la akcepto de la kongresanoj fare de la urbestro; la traduko de Hamleto fare de Zamenhof.

La Direktoro de la Sekcio pri Gramatiko,
Michel DUC GONINAZ

La Prezidanto,
D-ro A.ALBAULT

REPRESO DE LA OFICIALAJ DECIDOJ DE LA AKADEMIO ESTAS DEZIRINDA EN ĈIUJ PERIODAĴOJ

Kial "normaj"?

Antaŭ ĉirkaŭ 12-15 jaroj la Akademio oficialigis listeton de land-kaj landano-nomoj, "kiel ekzemplojn... kiuj estas sendube internaciaj, tradiciaj en nia lingvo, jam akceptitaj de la "granda plimulto". Proponita listo estis jam tre reduktita, sed plie sufiĉis, ke nomo estu kritikita de eĉ nur unu Akademiano, por ke ĝi estu senkompate eliminata el la listeto...

Hodiaŭ tre malfacilas grandigi tiun listeton! Ne multaj nomoj plenumas la tri kondiĉojn: internacieco, tradicieco kaj akceptiteco. Pro tio oni parolis iom ekscese-pri la "ĥaoso" en tiu nomenklature!

Kial tiu "ĥaoso"? En la unuaj broŝuroj, de 1887 ĝis ĉirkaŭ 1895, ZAMENHOF proponis sistemon, laŭ kiu ĉiuj nomoj sekvis jenan ekzemplon: "En Amerikujo vivas Amerikoj; en Holandujo-Holandoj". Sed premite de l' internacieco, li forlasis tiun sistemon jam antaŭ 1900. Aliaj volis inventi pli bone ol la Iniciatoro: dum jarcento ĝis hodiaŭ aperis ĉiaj "sistem"-proponoj; tiel ke, se la movado aperas en iu lando, prezidas la bapton de la landonomo ja la "sistem"-prefero de la loka korifeo.

La Akademio, konscia labori por la lingva unueco en la tempo kaj spaco, konstatante, ke neniu "sistemo" kapablis universaligi, ke ĉiuj fiaskis, konsideris, ke nur la Fundamento kaj ties 15-a Regulo povas helpi. Ĝi nun starigas, paŝon post paŝo, norman liston de landnomoj, surbaze kaj de internacieco kaj de tradicio: se nomo estas en uzado jam de 1930 aŭ de pli frue kaj kontestata de neniu, ĝi eniros la liston eĉ se ĝi estas plene ne internacia; sed nomo monde internacia enlistiĝos, eĉ se ĝi ne estas uzata.

Nur tiel ni povos eliri el la nomita "ĥaoso". Ĉiuj klarvidaj kaj lojalaj Esperantistoj volos klopodi por sekvi la tiel montritan vojon. Kiam la plimulto sekvos la liston, ĝi estos oficialigita.

La Prezidanto

KRONIKO de la NUNTEMPO

Nessie, la fama monstro de "Loch Ness"



Kiel pri la legenda marserpento, de tempo al tempo reŝprucadas demandoj kaj eĉ timo pri neologismoj. Verfakte se temas pri gramatikaj novigaĵoj, same kiel en la freŝaperinta lernolibro "ESPERANTO 2000 de Pietro Dao (kiu modifas la ortografion kaj aldonas novajn korelativojn), la neologisma fenomeno povas fariĝi danĝera, kiam ĝi trafas lingvostrukturon!

Sed pli ofte montriĝas nur laŭmodaj kapricoj, kiuj tiel subite malaperas, same kiel ili ekaperis, tre klara ekzemplo ĉi-rilate estas tiu de la vorto "neksta", kiu furoris en la jaroj 1960-aj kaj svarmis en la gazetoj... sed nun eĉ de longe forfalis en forgesujon! Kio cetere estas des pli memkomprenebla, ke tia plia vorto ne estis bezonata por nocio jam esprimebla per lavango da vortoj: ĉea, tuja, apuda, venonta, sekvanta, najbara, proksima, ktp... Kaj la tiama protesto estis nura tempesto en te-taso!

Aliflanke kontraŭa tendenco celas imiti la faman Jack Pomfrit (°) kiu proponis redukti la nombron de la vortradikoj per pli sistemigita kunmetado: Ekz-e li asertus, ni ne bezonas konservi la vorton "lipoj", se sufiĉas diri "kiskusenoj"-n!

*"Perfekta la racio forfuĝas el ekstrem'
kaj volas, ke ni estu eĉ saĝaj kun sobrem' (°°)*

Verdire ekzistas du specoj de vortoj: -la ĝeneralaj, komun-uzaj, de kunmetada deveno, kaj kun forta priskriba elvokiva valoro, kiel "kunveno" aŭ "malsanulejo"; kaj la nom-esprimaj, specif-uzaj, plej ofte sciencaj terminoj, de prunta deveno, kaj kun ofte internacia uzado, kiel "assembleo, konsilio, komitato, komisiono" por kunveno de aparta valoro kaj kiel "hospitalo, kliniko, lazareto, dispensario" por malsanulejo de aparta kondiĉo. Ja rekomendinde estas uzi priskriban kunmetaĵon kiel "dendoloro", sed kial malhelpi al dentkuracistoj paroli pri "odontalgio", se tio respondas por ili al pli preciza, science difinita nocio?

Jean THIERRY

°) Jack Pomfrit, heroo el humura prelego de Raymond Schwartz

°°) Molière, la teatra verkisto

La 21-an de aŭgusto 1987 forpasis nia Kolego D-ro István SZERDAHELYI, universitata docento, vicprezidanto de HEA, prezidanto de ILEI. La redakcio de L.A.E. sincere kondolencas niajn hungarajn amikojn.

BIBLIOGRAFIO

"Serta Gratulatoria in Honorem Juan Régulo" Volumen II: Esperantismo. Universidad de La Laguna, La Laguna-1987: 790 paĝoj. Kontribuoj de 32 Kolegoj kaj de 26-27 aliaj aŭtoroj.

"Nomina anatomica" 5th Edition, approved by the IIth International Congress of Anatomists at Mexico City, 1980. Entenas 6250 terminoj. Iniciatis tradukon al la Cina kaj al Esperanto inĝ. LI Kexi, kiu jam tradukis Atlason de insekta morfologio kun la helpo de Kol. Stop-Bowitz. D-ro Albault kontrolis la Esperantajn tradukojn de la anatomia vortaro kaj proponis aldoni la Francajn tradukojn. Li aldonos indeksojn en la Latina, Angla, Esperanta kaj Cina kiu aperos ideograme kaj "pinyin"-e. La eldono estas certigita en P.R. Cinio.

Esperanto kaj "International Herald Tribune" centjaraj.

Sub la titolo "Cu vi povas legi ĉi tion? Ne tiel malfacila ĉu ne?" la usona gazeto "International Herald Tribune" dediĉis longan artikolon al Esperanto kun intervjuoj de niaj Kolegoj Waringhien, D-ro Albault, H. Tonkin, kaj Piron. La 4-an de oktobro IHT festis la centjaran datrevenon de sia fondiĝo.

DEMANDOJ kaj RESPONDOJ

Demandoj fakte estis prezentitaj de diversaj amikoj dum la Universala Kongreso en Varsovio. Jen la respondoj, kiujn ni proponas.

1-D: Ĉu eblas, en estonta U.K. observi veran laborokunsidon de la Akademio? Do, ĉu eblas publika kunsido? (Puhe *okc.*)

R: Jen interesa sugesto! Mi promesas kliniĝi super ĝi en la venontaj monatoj! Tio supozus, ke ni kunvenigus la tutan Akademion en unu elektota loko de Okcidenta Eŭropo, almenaŭ por la unua fojo. Ankaŭ necesus doni monkompenson al ĉiuj ekster-Eŭropaj Akademianoj. Alloga kaj utila lingvo-temo estus debatita kiu povus arigi multajn samideanojn! Eble tio povos fariĝi, eble ne! Necesas studi la aferon.

A.A.

2-D: Ĉu la Akademio-pro sia malfleksebla labormetodo-ne estas efektive tro bremsita? Esperanto estas ne nur akademia lingvo, sed ankaŭ -kaj eble ĉefe-vivanta: ĝi dinamike evoluas sen troa atenteco al akademiaj aproboj. Ĉu ne eblas krei, eventuale kadre de la Akademio, iun aparaton malpli oficialan kaj pli flekseblan, ekz-e, "opinioj de Akademianoj"-kiu iom pli rapide povus sekvi la efektivan evoluon de la lingvo kaj iom direkti ĝin. (Amri WANDEL)

R.: Ĝuste por respondi al la bezono, kiun vi tiel bone priskribis, sed kiun multaj aliaj jam sentis estis kreitaj la asocio de la "Amikoj de l' Akademio de Esperanto" kaj la informilo "La letero de l' Akademio de Esperanto".

A.A.

3-D: "Estas en oftega uzado grafismaj variantoj de la supersignitaj literoj, ekz-e, ŭ anstataŭ la oficiala ŭ. Ĉu la Akademio, krom tolerado ne povus eldoni oficialan permeson?" (Bertil WENNERGREN)

Simila demando: "Ĉu uzi ian ajn signon bone legeblas?" (Jan HEJCMAN)

R.: Tolerataj estas ĉiuj signoj, kiuj klare modifas la bazajn literojn: ĉiu uzu ilin laŭ la ebloj de sia propra maŝino. Aliparte se iu tute ne havas disponeblajn signojn, tiu memoru, ke la Fundamento konsilas uzi anstataŭe diakritajn h: "Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, u, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u". Do la diakrita h anstataŭas la diakritan ĉapelon, sed la kronan u oni povas anstataŭigi per ordinara u. Jam Zamenhof konsideris, ke tio eblas. Sed atentu en la libroj por lernantoj: tiam la lernado de u/ŭ fariĝas pli komplika.

Tiaj elturniĝoj estas ja tolereblaj. Sed neniel povas esti demando, ke la Akademio eldonu oficialan permeson: la elturniĝo de iu ne povos esti tiu de alia; ekzemple se iu uzos la Slavajn bikornojn (renversitaj ĉapeloj), li tamen ofte ne povos ilin uzi anstataŭ ĥ aŭ ĝ... kaj la Slavajn signojn oni ne povas trovi en ĉiu presejo ...

A.A.

Ni establis la regulon, ke por respekti la serenecon de la debatoj interne de la Akademio, "La Letero de l' Akademio de Esperanto" ne prirespondos demandon kiu estos samtempe sub diskutado: ni atendas almenaŭ partan decidon pri la temo. Ekz-e, nun estas sub diskutado la difino aŭ/kaj ŭzebulo de la vorto: komunumo, komunaĵo, komuno. Neniu demando pri tiuj vortoj estos akceptita ĝis apero de decido.

Aliĝo al la asocio: "La amikoj de l' Akademio de Esperanto" IOOFF.

"La Letero de l' Akademio de Esperanto": jara abono: 120FF.

N.B. "La kotizo al la asocio ne inkluzivas la abonon al "La Letero". Sekve, oni abonas "La Letero"-n per aparta peto.

AKADEMIO DE ESPERANTO

Kiel vi ja scias, la AKADEMIO DE ESPERANTO estas la lingva institucio deveninta el la "KOMITATO DE LA LINGVO" fondita de D-ro L.L.ZAMENHOF en la 1-a UNIVERSALA KONGRESO de Bulonjo-ĉe-marŝo (1905).

Ĝiaj celoj kaj taskoj estas:

- Konservi kaj protekti la lingvon Esperanto laŭ ĝia Fundamento kaj kontroli ĝian evoluon.
- Esplori ĉiajn lingvajn demandojn, kiuj koncernas Esperanton.
- Kritiki verkojn el lingva vidpunkto.
- Defendi Esperanton kontraŭ ĉiaj konkurencoj.

LA AMIKOJ DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO

Tiuj taskoj estas gigantaj: la lingvo-problemoj ŝprucantaj el la ĉiutaga vivo de nia Esperanto-mondo ampleksiĝas en nemezureblaj dimensioj kaj la AKADEMIO DE ESPERANTO devas dinamike adaptiĝi al ĉiam novaj cirkonstancoj.

Laborigi Akademianojn vivantajn sur la kvin kontinentoj postulas I.a. la necesegajn financajn rimedojn. Tial al la Estraro de la Akademio venis la ideo krei ian "klubon" de la AMIKOJ DE L'AKADEMIO.

LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO

Por aŭdigi sian voĉon, por ĝuste aŭskulti kaj rapide respondi al la demandoj de Esperantistoj la Akademio nepre bezonas organon. Tial, ni proponas al ĉiuj Esperanto-uzantoj: membroj de Akademioj, de Universitatoj, verkistoj, sciencistoj kaj teknikistoj abonon "LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO" n kiu aperos trimestre.

"LA LETERO" estas destinata al ĉiuj, kiuj ŝatas flegi Esperanton kiel lingvon unuecan kaj volas ĝin kultivi kiel belan sed ankoraŭ minacatan planton.

Ĝi prezentos respondojn al demandoj de legantoj, deklarojn de akademianoj, decidojn de la Akademio, nuntempajn problemojn pri la Lingvo Internacia.

--NOMO :

Adreso:

aliĝas al la asocio LA AMIKOJ DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO
5, rue Léon Cogniet, F-75017 PARIS

Jara kotizo de valoro minimume egala je 100 F.F.

BANKO

CREDIT LYONNAIS Konto 7090 F CL Paris Courcelles.

POSTO

PARIS 735 27 B

--NOMO :

Adreso :

Abonas je LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO

5, rue Léon Cogniet F-75017 PARIS

Jara abono : 120 F.F.